# *Elektita la nacia premiito de Kultura ?urnalismo 2021*



**Reinaldo Cedeño,  ?urnalisto kaj recenzisto pri arto**

Havano, mar 19 (RHK) La ?urnalisto kaj recenzisto Reinaldo Cedeño Pineda ricevis la Nacian Premion de Kultura ?urnalismo José Antonio Fernández de Castro 2021, a?spiciita de la Ministerio de Kulturo.

Cedeño estas profesiulo, kies ?iutaga laboro en diversaj amaskomunikiloj de sia provinco Santiago de Kubo, evidentigis konstantan kaj valoran kontribuon al la kuba kulturo.

Post funda analizo kaj selektado, Cedeño estis elektita kiel la gajninto de la nacia premio. Lian kandidati?on proponis la kultura institucio  Domo de Karibio.

La ?urio estis kunvokita de la direkcio pri komunikado de la ministerio de kulturo, kaj ?in formis presti?aj reprezentantoj de la kulturo, recenzistoj ka ?urnalistoj kiel Pedro de la Hoz, Joaquín Borges Triana, Andrés Machado Conte, Yenys Laura Prieto, Vicente González kaj Omar Valiño, per la kunordigo de Alexis Triana, direktoro de la koncerna institucio.

Fonto: Cubaperiodistas.cu

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/251238-elektita-la-nacia-premiito-de-kultura-jurnalismo-2021

**Radio Habana Cuba**